Registered at G.P.O., Melbourne, for transmission by post as a newspaper.




(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:
BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).
Abono (por 10 numeroj):
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj——————Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.
Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.
Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.
Unu numero: 4 pencoj. :: :: :: :: :: Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.
Ce ĉiuj poŝtmandatoj kaj -monbiletoj igu S-ron Roy Rawson la pagato.

N-ro 152 (13th Year). MELBOURNE (AŬSTRALIO). 12 Junio, 1933.

# EL HISPANA PLUMO.

(La sekvanta peco estas el "Hispana Esperanto-Gazeto" de septembro, 1932)

**La Konsilaĉetanto**

—Sinjoro grafo—diris Patronio— : en ia urbo loĝis granda majstro, kiu ne posedis alian metion ol vendi konsilojn. La tutan tagon, li sidadis en sia butiko, kaj donis konsilojn, pli aŭ malpli bonkvalitajn, laŭ la mono, per kiu oni pagis al li.

Vojaĝanta komercisto, kiu transpasis la urbon, iris vidi tiun majstron, kaj petis, ke li vendu unu konsilon.

—Tre plezure mi tion faros—diris la majstro; sed vi devas al mi diri po kia prezo vi ĝin deziras.

—Donu al mi unu po **maravedi** (1)—diris la komercisto, donante al li la moneron.

La majstro prenis la moneron, gardis ĝin en la tirkesto, kaj al li diris:

—Mia amiko, kiam iu ajn invitos vin por manĝi, kaj vi ne konos la alportotajn manĝaĵojn, satiĝu per la unua alportata.

—Vi ne donis al mi grandan konsilon, diris la komercisto.

—Nek vi grandan prezon, respondis la majstro.

Tiam la komercisto al li diris, ke li donu konsilon po unu **dobla** (2), kaj la majstro, gardinte la moneron, al li parolis tiel:

—Amiko, kiam vi sidiĝos, okupu tian sidlokon, ke neniu rajtos al vi diri ke vi stariĝu el ĝi.

La komercisto denove diris al li, ke ne estas granda aĵo tiu konsilo, kaj la majstro rediris, ke ĝi rilatas al la de li pagata kvanto.

—Donu al mi do, unu po dek **maravedis**—diris la komercisto, al li donante la prezon.

La majstro, enpoŝiginte la monon, diris grave:

—Ne kuraĝu konsili tie, kie oni ne demandos vian opinion.

Ankaŭ tiu konsilo ne plene kontentigis la komerciston kaj li demandis unu po cent dek **marvedis.**

La majstro, post kiam li havis enmane la monerojn, parolis tiel:

—Mia amiko, kiam vi estos tre kolera, nenion diru aŭ faru ĝis vi konos la tutan veron.

Ankaŭ ne kontentiĝis la komercisto pro tia konsilo, sed ĉar li pensis ke se li volas koni pli da sentencoj, li fariĝos senmona, li eliris el la butiko, konservante en sia memoro tiujn.

Kaj la komercisto iradis je siaj komercaĵoj jarojn kaj jarojn, mare kaj tere, nek revenante al la urbo, kie li estis lasinta sian edzinon, nek sendante al ŝi siajn novaĵojn.

La edzino, tre malgaja pro la nescio de la sorto de sia edzo, pasigis sian vivon vartante kaj edukante filon, kiu el ŝi naskiĝis kelkajn monatojn post kiam la komercisto ekvojaĝis. Kaj tiom multe da jaroj estis pasintaj sen novaĵoj pri la patro, ke la filo fariĝis knabo kaj nigra, silkeca barbo ĉirkaŭis lian vizaĝon.

Ian tagon, la komercisto, ĉiam loĝinte en malproksimaj landoj, troviĝis sufiĉe riĉa por lasi la doloran vivon de vojaĝanto, ĝis tiam de li farita, kaj sin dediĉi al la ĝuo de la gajnita prospero, en sia naskiĝurbo, apud sia edzino. Li vendis siajn komercaĵojn kaj kun ĉiu sia havo li eniris en ŝipo ekvelveturonta por la havenurbo, kie lia edzino loĝadis.

Alveninte en sian urbon, li sola elŝipiĝis, kaj de neniu vidita li iris al sia hejmo, kie li eniris senbrue, sin kaŝante en malluma kaj ne loĝata ĉambro, kun la celo vidi kiel lia edzino vivas dum lia foresto.

Rigardante tra la ŝlosiltruo, li vidis ke ŝi pene kudras apud la fenestro. Sed li ne estis longan tempon en la dolĉa rigardado, kiam nekontenteco lin premis, vidante ke tio, kion lia edzino tiel pene kudris, estis vira ĉemizo.

Li jam ekeliris el sia kaŝejo, krionte kun granda kolero:

—Ni vidu, sinjorino, por kiu vi kudras tiel plezure?

Sed venis al lia memoro la konsilo aĉetita al la majstro, kaj diris al si mem:

—"Kiam vi estos kolera, nenion faru aŭ diru, ĝis vi konos la tutan veron." Ni atendu, do.

Atendanta li estis, kiam eniris tra la pordo belkreska knabo, kiu proksimiĝis al lia edzino per la brakoj etendataj, kaj estis de ŝi ricevata per multe da amo.

La komercisto pensis jam, ke lia edzino, kredante lin morta, edziniĝis al tiu viro, kaj tiel pensante, lin alpremis tiel freneza ĵaluzo, ke li sentis sin impulsata alkuri for de sia kaŝejo kaj mortigi la de li opiniatajn geedzojn.

—"Nenion faru aŭ diru ĝis vi konos la tutan veron"—al li diris tamen, en lia interno la aĉetita konsilo.

Li atendis, do, dank' al tiu sentenco, kaj kun pligrandiĝanta kolero li vidis kiel la virino aranĝis du lokojn sur la tablo, por manĝi, kiel poste ŝi alportis el la fajrujo kaserolon kun fumiĝantaj

manĝaĵoj kaj ŝi sidiĝis antaŭ ĝi, kune kun la bela junulo.

Apenaŭ povis jam sin estri la komercisto, premante inter siaj vestoj, la mantenilon de la ponardo, kiam li aŭdis kiel lia edzino diris:

—Ve, mia kara filo! Oni diris al mi, ke ŝipo venis el tiuj landoj, kie estas cia patro. Post kiam ni manĝos, kuru al la haveno kaj vidu ĉu surŝipe estas iu, kiu povas cin sciigi pri li, ĉar mi mortas pro ĉagreno nescii kia sorto estas veninta al li.

Rememoris tiam la komercisto, ke kiam li estis foriranta, estis atendata naskiĝo de infano, kiu, pro la forkurintaj jaroj, tre eblé povas esti tiu junulo, kaj antaŭen puŝate de tiel plaĉa ideo, li eliris kurante el la kaŝejo kaj ĉirkaŭprenis la patrinon kaj la filon per granda karesemo.

Rememorante, ke la konsilo aĉetita al la saĝulo, kvankám ĝi ŝajnis al li, komence, malmulte valora, al li evitigis fari teruran krimon, kutimis diri la komercisto:

—Neniam mi elspezis monon pli bone uzata.

(1) Maravedi:—Monero, plej ofte kupra.

(2) Dobla:—Ora monero. La valoro de tiuj antikvaj moneroj ŝanĝiĝis laŭ la epoko.

## MARKUS ZAMENHOF KAJ ESPERANTO.

Preskaŭ ĉiu legema Esp-isto scias ("Vivo de Zamenhof": Privat, p. 65) ke Markus F. Zamenhof, la patro de la aŭtoro de Esperanto, devigis la junan entuziasmulon bruli la kajerojn de lia lingvoprojekto, sed ne estas ĝenerale konate, ke en siaj lastaj jaroj li lasis malstreĉiĝi sian antaŭan malfavoran sintenon kontraŭ la elpensaĵo de sia genia filo. Jen eltiraĵo el "Originala Verkaro" p.53, date 1910:

"En la jaro 1905 mia karmemora patro komencis la publikigadon de kvarlingva frazeologio - proverbaro, super kiu li laboris kun amo en la daŭro de longa tempo. Ĉar li esprimis la deziron, ke lia verko, krom la partoj rusa, pola, franca kaj germana, enhavu ankaŭ parton esperantan, tial mi prenis sur min pretigi tiun ĉi parton, kiu estis eldonota poste kune kun la partoj en la aliaj kvar lingvoj kaj provizore komencis eliradi per apartaj kajeroj (paralele al la kajeroj kvarlingvaj) sub la titolo 'Proverbaro Esperanta.'

Bedaŭrinde mia patro mortis, kiam nur duono de lia verko estis eldonita (la elirintaj kajeroj estas riceveblaj ĉe la firmo Moller kaj Borel en Berlino). La manuskripto de lia tuta verko estas finita, sed eldoni ĉiujn kvin partojn de la verko en la nuna tempo estas malfacile; tial mi decidis, antaŭ ol la tuta verko povas esti eldonita, eldoni almenaŭ aparte la parton esperantan. La ĝis nun ankoraŭ nepublikigitan lastan parton de la 'Proverbaro Esperanta' mi publikigas nun en 'La Revuo,' kaj poste la tuta verko eliros en formo de aparta libro . . . . L. L. Zamenhof."

(Vidu "La Revuo" iv, 1909/10 p. 241.)

## LITERATURO PRI LA ELEFANTOJ.

En iu literatura klubo Londona kelke da membroj, ĉiuj apartenantaj al diversaj nacioj, decidis studi kaj poste priskribi la vivon de la elefantoj. Ili disponigis al si jaron por tio, post kiu tempo ĉiu prezentu sian verkaĵon.

La dek du monatoj pasis, kaj ili denove kunvenis en la klubo. La anglo prezentis malgrandan volumon binditan per porkhaŭto kun la titolo: Elefantoj de mi mortpafitaj.

La ruso venis kun libro belę bindita en rusledo kun la skeptika nomo: Cu vere ekzistas elefantoj?

La franco estis verkinta libreton kun rozkolora bindo titolitan. La ama vivo de la elefantoj.

Kiam venis la vico de la germano, tiu ĉi telefonis al la teretaĝo kaj baldaŭ du servistoj enportis dek ses egajn volumojn, kiuj havis kiel titolon: Mallonga enkonduko en la studo pri l'elefantoj.

La polo montris fiere sian broŝuron: La elefantoj kaj la demando pri la pola koridoro.

Fine venis la vico de la usonano. Lia libro estis riĉe ilustrita, kaj la kovrilo anoncis per grandaj orliteroj: Pli grandaj kaj pli bonaj elefantoj!

(Variantoj de ĉi tiu anekdoto aperis en "Occidental" 5/6, 1932, kaj en "Sistema Kurso de Esp-o," de Seppik-Malmgren.)

## ESPERANTO JA VIGLAS EN AŬSTRALIO!

Ĉu estas kredeble, ke tion raportas fremdaj vizitintoj al Aŭstralio, reveninte en siajn landojn? Ni ne sentas en ni fortan certecon, ke jes.

La taggazetoj jus informis, ke komunistoj disdonis al la anoj de la krozŝipo "Koln" ruĝan legmaterialon en germana lingvo; evangeliistoj ankaŭ foje vizitas la eksterlandajn ŝipojn por dissemi Biblipartojn en la konformaj lingvoj. Tiuj homoj tiel ardas kaj kredas je sia afero, ke ili volonte oferas sin en tian laboron. Ĉu Esperantistoj agas simile? Ĉu la "Koln"-anoj ricevis impreson, ke Esperanto flore vivas en Aŭstralio? Se ne, tio rezultas el grava preterlaso de tiuj zamenhofuloj disponantaj la tempon kaj bonokazon. Ekzistas Esp. rondoj, kiuj antaŭ ĉio akcentas la gravecon disporti la lingvon inter tiuj ĝin nekonantaj, kaj sisteme difinas por tiu celo devojn plenumotajn de siaj membroj. Ĉu ne farinde, ke estu elektitaj el tiuj rondoj fideluloj, kiuj iru, armite per taŭglingva materialo, por kontaktigi alinacianojn kun Esperanto, aŭ almenaŭ disaŭdigi inter tiuj la nomon? En ĉi tiu konekso menciinda estas la ekzemplo de niaj samcelanoj en Wellington, Nov-Zelando, kiuj sendas pri-Esperantan legaĵon al ĉiuj fremdaj vizitantoj al tiu urbo.

## DEMANDOJ.

Kiom da infanoj havis d-ro Zamenhof? Iliaj nomoj?

Kiu estis la unua proza originalaĵo en Esperanto? La unua tradukaĵo?

Kiu estas la plej granda biblioteko en Australio?

Kiu lingvo estas la plej multhome parolata—la pola aŭ la portugala?

Kiom da lingvoj estas en la mondo?

## PRI PSEŬDOAFIKSOJ.
**(vidu p. 31)**

Laŭ mia opinio la propono estas tute ne taŭga. Ni pripensu la vorton "poligloto." La aŭtoro proponas la parton "poli" taksi prefikson. Sed se ni agus tiel ni estus sub devigo akcepti la radikon "gloto," ĉar ĉiu prefikso povas esti almetata al la radiko.

Same ni devus akcepti la vorton "fono" (polifono). Sed ĉi vorto jam ekzistas en esp-o k havas tute alian sencon. Sekve per tia enkonduko ni nur pli malfaciligus la lingvon.

Plue "monologo, monopolo, monotona" . . . Se ni disŝiros la du unuajn vortojn, ni havos nur kuriozaĵojn (mono-logo, mono-polo). Ankoraŭ mi demandu: ĉu estas necesaj ĉi tiuj afiksoj?—Ho ne! Ni jam havas la prefiksojn "mult, antaŭ, mem" la vortojn "dio, vivo" k. a. Estus utile akcepti la novajn afiksojn, se ili havus novan aŭ almenaŭ pli ĝustan signifon. El ĉiuj ĉi afiksoj povus esti utila nur "tele," tamen ne en la vortoj "telegrafo, telefono" (kie ĝi kreus nur miskomprenon) sed en la vortoj: teleskribilo aŭ teleparolilo. Tamen mi dubas pri la bezono de ĉi enkonduko. Nikoloa Usov. Turksib, Sovet-Kazakio.

(Krome, "or'", "te'", eĉ jam "aŭt'" havas aliajn signifojn (A. gold, tea, motor-car). Rimarku ankaŭ ke laŭ la originala artikolo "tele" **ne** "telen" signifus "malproksimen." Red. S.K.)

## NEKROLOGO.

**Payne.**—Je la 13 Aprilo, ĉe Masterton, N.Z., mortis s-ro Herbert Payne, 93-jara. S-ro Payne estis la edzo de la mortinta s-ino L. Payne, dum multaj jaroj pioniro-sekretariino de la Masterton Esp-o Klubo. Kvankam ne-Esperantisto, li multe kuraĝigis kaj subtenis ŝian edzinon en ŝiaj laboroj por Esperanto. Je la entombigo, paskan sabaton, la N.Z.E.A. estis reprezentata de la prezidanto, s-ro L. E. Dust, kaj la loka klubo de s-ro H. Franks, sekretario.

**Our Address:**—Please note that the Elizabeth-street Post Office is not the **General** Post Office, which is at Spencer-street. Use the form "Elizabeth-st. P.O.".

# POR LA VIRINOJ.

La laborema dommastrino de ĉirkaŭ 1870 vere estis dommastrino. La komplikaĵoj de la vivo lasis al ĉi neniom tempon por la briĝfesto, politikaj kaj socialaj interesoj. Ŝi devis fari ĉion per siaj du manoj—eĉ nigrigi la fornon, balai la tapiŝon, kaj purigi la lampojn. Ne por ŝi la vakua purigilo, la telefono, elektro, gaso, ktp. Ŝi okupis sin la tutan tagon pri detaloj, kiuj nun eĉ ne ekzistas. Ŝi portis vestojn je la nura ekvido al kiuj ni svenus. Jes, mi ne miras, ke ŝi estis virtulino. Kiel fali en tenton se mankas al vi la tempo, kaj, post granda laboro, la energio?

—E.G.

## LA EDZIĜO KAJ LA MONO.

Rimarku la esprimon sur la vizaĝo de iu viro paganta al sia edzino la semajnan domelspezon. En la momento, li ne estas tute certa ĉu aŭ ne li pentas sian edzkontrakton. La funtbiletoj, kiujn li donas al sia edzino aĉetiĝis siavice de lia libertempo, eble lia sano, kaj multaj el lia personaj inklinoj. Ili reprezentas longajn horojn de laborado, terurajn momentojn, kiam lia estro portas en sia okulo aspekton de eksigo, kiam la bankisto malafable rigardas lian ĉekon kaj lin turnas al la tratinto. Interŝanĝe li havigis tion, kion li celis havigi: hejmon, edzinon, infanojn, radion, kaj kanarion en la fenestro.

La virinoj, plejparte, pagas por siaj penoj per mono de iom malsimila speco. Ili tratas grandajn bilojn de sia sano, nervoj, menspaco. La tipa dommastrino aĉetas sian dimanĉan viandon kun sopiro, sian novan ĉapelon kun granda dubo. La kontoj de la kuracisto estas pagataj kun sendormaj noktoj kaj du-tri sulketoj. Sed, nekutimite al la kalkulado de tiaj nepalpeblaj kontoj, ni ankoraŭ inklinas al tiu praantikva ĉarmega fantazio, la fantazio ricevi ion kontraŭ nenia pago. Estas bonekonate, ke la ina temperamento ne povas rezisti tiun allogadon. La plej maliluziigitaj inter ni virinoj ankoraŭ paŭzas ĉe la tabloj de malkaraj restaĵoj magazenaj, kaj ekzistas malmultaj virinaj spiritoj, kiuj ĉiam pripensas, ke estas ridinde elspezi tempon kaj veturprezojn por atingi pli malkaran aĉetcentron. Sed en nenia parto de la Vendejo de la Sorto la virinoj tiel persiste kaj gajkore atentas havigi al si la plej bonan parton de la traktado, kiel en la marĉando por akiri edzon.

(Olive Mary Salter, en "Good Housekeeping.)

## GERMANA SUPO.

Metu unu pajnton kaj duonan da senŝeligitaj pizoj en kaserolon kun unu kvarto (1.136 litroj) da akvo, te-kulero da salo, du-tri branĉetoj de petroselo kaj mento, kaj du malgrandaj bulboj. Boligu ĝis molaj kaj trafrotu tra kribrilo. Remetu en la kaserolon kun kvarto da akvo, unu unco da butero, kaj boletigu kvinminute plilonge, kaj aldonu unu kuleregon da kremo. Miksu kvaronkvarton da lakto kun unu tuta ovo kaj tri flavaĵoj de ovoj kirlu, gustigi laŭ deziro, enmetu en pelvon, kaj baku ĝis firma. Kiam malvarma, tranĉu en kvadratojn, enmetu en la supon kun peceto da butero kaj iomete da sukero, kaj servu.

## KIE ONI NE KISAS.

Ĉu ni vere povas imagi, ke ekzistas ankaŭ homoj, kiuj ne scias, kio estas kiso? Sed efektive ekzistas popoloj, kiuj — vidante nian kisadon — devus opinii ĝin io tre nedeca. Ili havas salutmanierojn, kiujn ni preskaŭ ne povas kompreni niaflanke. La indiĝenoj de Ŝitagongo salutas, metante buŝon kaj nazon sur la vangon de la alia, kvazaŭ por flari ĝin longtempe kaj forte. Se iu dirus al ili "Kisu min," ĉi tio estus ne komprenebla al ili; oni devus traduki per "Flaru min." Mongola patro ne kisas siajn infanojn, sed priflaras ilian hararon. Se sudmara insulano deziras speciale honori iun alian, li ekverŝas akvujon sur lian kapon. Kontraste al ni, ĉino—dezirante esti ĝentila—metas la ĉapelon sur la kapon; kaj kiu en Japanujo respektas la moron, tiu senŝuigas siajn piedojn ĉe salutado. Se en Persujo oni deziras esprimi al iu sian specialan altestimon, oni proksimiĝu al li nur nudpiede. La araboj kisas al si reciproke la piedojn aŭ genuojn, kaj al altranga persono oni kisas la borderon de la vestaĵo. La loĝantoj de la Orbordo klinas sin profunden salutante, prenas la survestaĵon de la ŝultro kaj faldas ĝin sub la brakon. Ĉe vizito inter la indiĝenoj de Brazilo la vizitato prezentas al la gasto seĝon, kaj poste ambaŭ restas proksimume dum unu minuto en plena silento; nur poste la vizitato miregе ĉirkaŭrigardas kaj demandas laŭtvoĉe: "Ĉu vi ĉeestas?" Se Basuto alparolas sian gentestron, li salutas lin per la titolo "sovaĝa besto," kio al ni certe ŝajnas esti malmulte flata, sed al la oreloj de la gentestro sonas kiel muziko, ĉar jen honoro, prezentata al liaj kuraĝo kaj forto.

(El "Germana Esperantisto.")

## PRINTEMPO.

J.G. de Mosman demandemas:—

Onidire, "en la printempo la penso de juna viro direktiĝas al la amo." Ŝajnas al mi ke en la printempo junaj viroj pensas pli pri l'poezio. Ĵurnale, gazete oni legas odojn al la printempo, kiuj devas esti pliĝuste nomitaj odoj al la amo. Tial la maksimo eble estas prava.

Pro kio estas la printempo tiel elektata? Ĉu vi diras "pro ĝia belo"? Mi diras, ke la printempo ne estas la plej bela sezono el la kvar. Kun ĝi venas la gripo, ŝanĝiĝema vetero kaj muŝoj.

Kiu plaĉas al la homoj, tiu estas la tielnomata "juneco" de la printempo. Juneco! La plej bela vorto el ĉiuj. Verkas la poetoj nek "odon al la printempo" nek "odon al la amo" sed odon al la juneco. Kaj estante poetoj ili ne scias, ke la printempo estas samtiel maljuna kiel la aliaj sezonoj.

(Antaŭ ĉi tiu profunda enigmo, ni klinas la kapon, venkite. "S.K.")

## LA EDZINO DE LA BRUTARPELISTO.

(daŭrigata.)

Certe la mateno nun alproksimiĝas; sed la horloĝo estas en la domo. Ŝia kandelo preskaŭ forbruliĝas; ŝi forgesis, ke ŝi nur havas la unu. Ŝi devas alporti pli da brulligno por la fajro, kaj tial ŝi fermas la hundon en la kuirejo kaj rapidas al la ŝtiparo. La pluvo estas forblovita. Ŝi ekprenas ŝtipon, eltiras ĝin kaj—krak! la tuta amaso disfalas! Jen la kialo:

Hieraŭ ŝi kontraktis kun vaganta indiĝeno, ke li kolektu por ŝi brullignon, kaj dum li laboradis, si foriris por serĉi perditan bovinon. Ŝi estis for dum unu aŭ du horoj, kaj la nigrulo bone uzis sian tempon. Je ŝia reveno ŝi tiom miregis vidi sufiĉan grandan ŝtiparon apud la kamentubo, ke ŝi donis al li ekstran pecon da tabako, kaj laŭdis lin pro tio, ke li ne estis mallaborema. Li dankis ŝin, kaj foriris kun fiera mieno kaj la kapo rekta. Li estis la lasta de sia gento, kaj Reĝo: sed li konstruis tiun ŝtiparon kun kaverno en la centro!

Ŝi ofendiĝas nun, kaj larmoj ekvenas al la okuloj, kiam ŝi eksidas denove ĉe la tablo. Ŝi prenas naztukon por forviŝi la larmojn, sed, anstataŭ, puŝetas la okulojn per siaj nudaj fing-

roj. La naztuko estas plena da truoj, kaj ŝi trovas, ke si metis la dikfingron tra unu, kaj la montrofingron tra alia. Tio ĉi ridigas ŝin, je la miro de la hundo. Ŝi havas viglan, tre viglan percepton pri la ridindeco, kaj iun tagon ŝi amuzos kamparulojn per la rakonto. Ŝi tiamaniere amuziĝis antaŭe. Unu tagon, ŝi sidiĝis por "havi bonan ploradon," kiel ŝi diris—kaj la maljuna kato sin frotis kontraŭ ŝia robo kaj "ploris" ankaŭ. Tiam ŝi ne povis ne ridi.

(finota.)

### TO OUR SUPPORTERS.

Thanks for the following:— Mr. Ramm, 4/6, May, '34; Mr. Huebner, 25/-, Oct., '36; Miss Hopton, 4/6, June, '34; Mrs. Wilson, 4/6, June, '34; Miss Conwell, 4/6, May, '34; Mr. Adcock, 5/-, March, '34; Mr. Cleary, 4/6, April, '34; Mr. D. Miller, 4/6, Jan., '34; Coburg Esperanto Group (Sales), 17/4; Miss Remington, 4/6, June, '34; Mr. Eliot (adv.), 1/6; Melbourne Esperanto Club, Subs. £1/14/-, Sales 6/-.

### NIA POSTO.

S-ino C-T. en N.Z.—Via noto pri "plur' ". La radiko estis oficialigita en la kvara aldono (1929) al la Universala Vortaro, kun difinoj "plusiers; several; mehrere; pli ol unu." Ĉu vere tio estas kontentiga? Jam "du" estas "pli ol unu," sed "du" ne estas "several." La angla niaopinie devas teksti "more than one." Studu ankaŭ la difinon en Plena Vortaro. "More than one person bore witness to that" (Pluraj personoj atestis tion). Traktante ĉi tiun punkton rimarku, ke la similsenca "kelk' " havas la francan difinon "quelque, plusiers" kaj la anglan "some, a few." Vi diras, ke Zamenhof ne aprobis la radikon "plur' ". Eble tio estas vera, sed ĉu Zamenhof, se ankoraŭ vivanta, aprobus ĉiujn radikojn oficialajn de la Lingva Akademio? Jen la demando, car laŭ liaj diroj li alte respektis la autoritaton de tiu institucio.

"Plural' " estas radiko nepre nur gramatikafaka. kaj paralela formo kun "singular' ".

### "B.E.S. ADRESARO."

There are for disposal eight of these splendid little address-books, at 1/- each, plus 1d. postage. Names and addresses of some 1500 individuals and Esperanto enterprises are compiled in handy form for the use of the correspondent.

Apply at once to agent, "La Suda Kruco," Box 731F., P.O., Elizabeth-st., Melb.

---

Mr. L. Thomson is agent in Australia for all publications of **"Literatura Mondo"** and **"Oomoto."** This address finds him.

## RADIO COLUMN.

Speakers are requested to send in by 10th July at latest, particulars of any broadcasts arranged.

Esperanto lessons will be broadcast from 3AR at 7.45 p.m. on the dates mentioned below. An anecdote will be read at the end of each lesson to enable students to check their pronunciation.

**June 24th.**—Ĉe la pordo de teatro junulo puŝiĝis kontraŭ sinjorinon. "Besto!" ŝi ekkriis. "Pardonu min," li petis ĝentile. "Kaj mi vin," respondis la sinjorino. "Mi kredis, ke estas mia edzo."

**July 8th.**—En balo: "Fraŭlino, mi kuraĝas peti al vi, ke . . . " "Mi bedaŭras, sinjoro, sed mi jam forpromesis ĉiun dancon." "Pardonu, fraŭlino; mi petas ne dancon, sed nur, ke vi stariĝu; vi sidas sur mia ĉapelo."

### RADIO-WARSAW!

Short-wave users! Listen in to Warsaw on 12 and 26 July at 22h. 35m. to 22h. 55m., Polish time. The respective subjects will be "Protection of the Blind in Poland," by Z. Sobota, and "Esperanto and the role of the Poles in its dissemination," by T. Hodakowski. These speeches will be given in Esperanto. Any Esperantist picking them up is asked to get in touch with "Polskie Radjo," in Warsaw and Kracow.

---

In 1932 there were 2090 Esperanto broadcasts from 94 stations in 17 European countries. These consisted of 445 lessons and 1645 talks in or about the language.

### THE SIMPLE BERBER.

Radio go-getters will trudge the streets of Moorish towns, and urge their cars through the sands of Sudanese deserts, to peddle old-style wireless sets to those who still sit in darkness.

A certain Berber high-light ordered from one of these merchant adventurers a set to go with his sewing machine, vacuum cleaner, gold teeth and the rest. It came, was installed and declared in order. The Berber turned the dials by direction and listened . . . .

"This is station London. You have just heard . . . . "

"Station Rabat, vous venez entendre les derniers cours de Bourse . . . . "

"Statione Roma-Napoli . . . . "

"Hier ist der Norddeutsche Rundfunk . . . . "

And he listened on, amazed. A wonderful thing wireless, certainly. But soon the simple countenance became o'erclouded. He beckoned the man of commerce over to him, and asked, maybe having vaguely in mind certain expansive promises auxiliary to the sale: "The set is indeed good, but where is the little machine that enables me to understand all that is broadcast?"—— You see, he was thinking of some sort of "translating machine," which piece of mechanism, with all our progress in radio technics, has not yet arrived.

We leave the disappointed Berber, knowing that even in those countries priding themselves most on their advancement, there are thousands and thousands of listeners like him who receive day after day with puzzled brow "information" from foreign stations. Why on earth isn't Esperanto, a "translating machine" ready to hand, in general use for such purposes?

(Translated from "La Germana Esperantisto.")

### FROM "HAMLET."

Fraser Tytler, in his "Principles of Translation" deems the following an extremely difficult passage to translate, owing to the presence in it of antiquated terms. He says "It would require no ordinary skill to transfuse into another language the thoughts of the following passage, in a similar species of phraseology":—

"For Nature crescent doth not grow alone
In thews and bulk; but as this temple waxes,
The inward service of the mind and soul
Grows wide withal. Perhaps he loves thee now,
And now no soil nor cautel doth besmirch
The virtue of his will."

Act 1, scene 3.

This is Zamenhof's rendering. According to "Parnasa Gvidlibro" he translated "Hamlet" from the German text of Schlegel-Tieck.

"La natur', kreskante,
Grandiĝas pli ne sole per la korpo
Kaj per la forto de la sama sento;
Kun la kreskado de la tempo ofte
Ŝanĝiĝas la spirito kaj la servo
Interne. Nun li eble amas vin;
Nek trompo nek malico nun makulas
La virton de l'animo lia."

---

## MALNOVAJ JARKOLEKTOJ DE "LA SUDA KRUCO"!

**Haveblaj estas tiuj de 1920 ĝis 1932, je kosto de du ŝilingoj por ĉiu.**

**Turnu vin al nia adreso!**

# RECENZOJ.

**FACILA LEGOLIBRO**:— Kompilita de K.R.C. Sturmer; eldonita de The Esperanto Publishing Co. Ltd.; pĝ. 63; prezo unu ŝilingo, plus afranko.

La verketo konsistas el resumoj de naŭ elstaraj romanoj Esp-aj kaj du artikoletoj, unu pri la praktika utilo de Esperanto kaj la dua pri ĝia literaturo. La kompilaĵo estus pli interesa kaj valora se la farintoj de la resumoj estus eĉ pli rigide ignorintaj ĉian akcesoran incidenton ne necesan al la rakontskeleto, kaj tiam aldonintaj ian takson pri la ĝenerala tendenco kaj ŝatindeco de la koncerna verko kaj pri la karakterizaj trajtoj de la aŭtora stilo kaj lingvaĵo. Ekzemple Alec Venture tute superflue enpakis en la skizon de "Viktimoj" la tute flankaferajn liniojn pri Dogler kaj pri la pantalonvendado de Izor. Li pli efike estus aginta se li ellasus tiujn kaj anstataŭe uzus la spacon por doni impresojn pri la verko kiel tutaĵo. Plue, la tute diversaj esprimecoj de "Saltego trans la Jarmiloj" kaj "Mirinda Amo" estas preskaŭ forviŝitaj de la relative similaj inter si stiloj de la du resumantoj. Kelkapaĝe en la rakontoj certan konfuzon sentas la leganto, penante sekvi la trorapidajn movojn de la dense arigitaj roluloj. Li konscie-nekonscie palpas per ŝercanta spirito la vortremburaĵon de la romanoj, kiaj ilin verkis la aŭtoroj mem.

Ĉefe valora estas la bona kompakto pri la Literaturo de Esperanto, de W. B. Johnson, sed malgraŭ ĝia necesa mallongeco, multaj opinios bedaŭra la foreston de ia mencio pri ekzemple la gravaj tradukoj de Bulthuis—"Imperiestro kaj Galileano," "La Leono de Flandrujo," kaj "Jane Eyre," pri tiuj el la rusa, "Princo Serebrjanij" kaj "La Kapitanfilino" trad. de Ŝidlovskaja, kaj pri "Eugene Onegin" de Puskin, trad. de Nekrasov.

Finvorte, la verketo, malgraŭ ĝiaj korekteco kaj bona stilo, ne impresas kiel tre taŭga por lernantoj, ĝuste pro ĝia formriĉeco kaj ia senĝena flueco, kiujn povas absorbi kun plezuro nur la progresinto.

---

**Politika Sociala Revuo,"** trimonata. Prezo 40 francaj fr. por kvar kajeroj, sume 320 paĝoj inoktavaj. Gvidkomiatato: Bernard Lavergne, profesoro ĉe la Universitato de Lille; Fritz Kern, respektive ĉe Bonn; W. E. Collinson, respektive ĉe Liverpool; Gaston Waringhien, respektive ĉe Liceo de Lille, kaj Louis Bastien, Generalo Intendanto.

Salutinde estas la apero de tiu kvaronjara revuo, kies sobra unukolora kovrilo similas tiujn de certaj influaj anglaj periodaĵoj. Ĝi celas liveri al la klera publiko dokumentitajn studojn pri ĉiaj problemoj de la socia vivo. Ĝi enhavos principe nur tradukojn de plej taŭgaj artikoloj aperintaj en la nacilingvaj revuoj. La redaktoroj estas homoj nepre kompetentaj en siaj internaciaj medioj; la tradukistoj esperantistoj prezentantaj ĉiajn garantiojn pri lingvokono.

La unua nro enhavas (1) Ŝattakson pri Charles Gide, ekonomikisto. (2) Valoran studon pri la Respublikoj de la Jezuitoj en Paragvajo. (3) Analizon de la Spirito de la Germana Popolo en la nuna tempo. (4) Profundevidan studon pri la Franca Karaktero vidalvide al la Moderna Mondo. Ankaŭ estas leginda recenzo de G. Waringhien pri "Pol-Pomeranio," kiu libro lastatempe aperis en Esp-o.

Makulas ĉi tiun cetere brilan eldonaĵon tro da preseraroj, foja ellaso de la akuzativo, kaj ambaŭa uzado de "k" kaj "kaj" en sama artikolo. Observo: "Ili estis tro obeemaj, **ol ke venus** al ili la penso ekribeli"; "Tiu instruo estis tro valora, **ol ke ni lasus** ĝin stari." Zamenhof preferis fari tiajn parolturnojn jene:—"Ĝi estis tro kaduka, **por ke oni povu** lasi gin stari" (Fabeloj de Andersen iii, p. 23 kaj 88; aŭ "Ĝi okupis tro altan situacion, **ke oni povu** supozi, ke ĝi akceptos inviton buŝan" (p. 85).

Vere subteninda entrepreno de homoj kun alten-direktataj koroj.

Turnu al:—Prof. G. Waringhien, 13 Place Simon-Vollant, Lille, Francujo.

---

**"Systematisk Kurs i Esp-o,"** de Seppik kaj Malmgren, eld. de Forlagsforeningen Esperanto, Stockholm u.p.a. Prezo 0.75 oeroj. Jen post nur monatetoj alvenis la dua eldono de tiu bona kursilo. Svedoj en Australio volantaj lerni Esp-on per sialingva instruilo estas petataj turni sin al nia adreso.

Ankaŭ el sama eldonejo venas **"Esperantisk-Svensk Ordbok,"** kompilita de Paul Nylen, sveda veterano. Sur bona papero, 231 pp. de dense kompostita teksto, bazita sur la plej konataj, eĉ tre modernaj, ekzistantaj vortaroj. Prezo 3.75 kr. Ampleksa pritrakto de la derivoj de radikoj; sub "ven'" oni havas 27 devenaĵojn kun svedaj difinoj kaj Esp-aj frazekzemploj. Valora unuecigilo por nia lingvo inter la svedoj.

---

De s-ro Nekrasov, Spiridonovka 15, Moskvo, venas du libretoj:—(1) **"Ĉinaj Noveloj,"** eld. de Ekrelo, Leipzig, aŭtoro O. Erdberg, P. 72, prezo naŭ pencoj.

Kolorriĉaj, brile verkitaj skizoj pri la vekiĝanta ĉina laborularo. En ĉapitro Taj-ana Simfonio terura bildo de la sklavsistemo reganta en japane-posedata kotonfabrikejo. En Fenikso la besta mortigo de pionira organizanto de kamparana unio kontraŭ feŭda ekspluatisto. Ĉi tiu pensiga verketo ĵetas valoran lumon sur la komunist-(iĝant)ajn regionojn de Ĉinujo. Jam kvinono de tiu landego (do 60,000,000 homoj) estas "areno de triumfanta soveta movado," kiu "kiel stepa incendio ĉirkaŭkaptas unu provincon post alia."

(2) **"La Rezultoj de la Unua Kvinjarplano."** Raporto de I. Stalin, 7 Jan. '33. 48 p., prezo 5p.

La soveta ĉefo komencas per citoj el eksterrusaj gazetoj, montrante iliajn ĥaose diversajn opiniojn rilate al la plano. Kelkaj krias pri ĝia fiasko; aliaj alarme avertas pri ĝia sukceso kaj konsekvenca minaco al la individuisma ekonomio. Tiam Stalin klarigas pri la baztaskojn de la plano kaj la plenumrezultojn en agrikulturo kaj industrio, kaj pretendas, ke la stato de ties labor- kaj kampuloj konstante pliboniĝas dum ke daŭre pliakriĝas la mizero de la ceteralandaj. Li finas asertante, ke la soveta sistemo "atingis tian venkon, kiu havas vere mondhistorian signifon, dank'al I. La entuziasmo de la multmilionaj amasoj; 2. La firma gvidado de la partio kaj registaro, kaj 3. La specifaj kvalitoj kaj avantaĝoj de soveta ekonomia sistemo." Tralibre la trad-oj bojkotas "ebl'" uzante nur "posibl'". Kion precize signifas "rajono," kaj kiasence estas uzata "patos'"?

Mirinde malkara legaĵo, valora ankaŭ pro nefacilo aĉeti apartajn paroladojn de Stalin tradukitajn angle.

---

**"Step by Step in Esperanto,"** by M. C. Butler, 4th edition, revised. Price 1/6 paper, 2/6 cloth, plus pstg. from The British Esperanto Assoc., 142 High Holborn, London, WC1.

Mr. Butler is a bright pedagogue; by which we mean witty as well as brilliant. His book is filled from margin to margin with sound instruction lit up throughout by flashes of well-directed humor. Reading it with the aim of picking out doubtful points in grammar or syntax the most scrupulous Zamenhofan will turn the last page with his note paper still unmarked by any observation of diversion from the classic standard. Only in the matter of arrangement of the material does the present reviewer fail to follow the mind of the author. The contents of the book must surely strike the user as being, as it were, dispersed; there lacks that sequence or grouping of elements most naturally looked for. We have, for instance, "-as" on p. 46, "-is" on p. 76, and "-os" on p. 137; "-u" on p. 48 is continued on p. 177. A further point is that Mr. Butler has omitted treatment of the two distinct significations of "el-" as used, say, in "ellerni" and "elfosi," a matter regarded by Paul Fruictier as calling for somewhat lengthy consideration ("La Esperanta Vortfarado," 1914, p. 91-2).

It will seem to some rather amusing to read that after having mastered some 240 pages of often densely printed text the learner "should now pass the Elementary Examination of the B.E.A. with distinction."

Much of the interesting and valuable addenda to the early editions has been omitted in this to give place to reading exercises. We hope to see it reappear one day in a book designed by Mr. Butler for advanced classes.

A soundly based compilation from a conservative hand, and real value for the money. (ROBO).

## RESPONDOJ.

Tri. Adam, Sofja, Lidja.

"Marko Kraljevic," rakonto de M. Abesgus, 1897. "La Gefratoj," de Goethe, tradukita de Grabowski. 1889.

La Melburna Publika, kun 500,000 volumoj.

Lau la 1927 j-a UEA jarlibro la portugala kun 28,000,000. Parolas pole 25 milionoj.

A. Meillet, en sia "Les Langues du Monde" (1924) donas la nomojn de 3600 lingvoj, dialektoj, idiomoj, mortintaj kaj vivaj. Antau la milito aperis sistema libreto de F. Finck, "Die Sprachstamme des Erdkreises," kies dua eldono 1915 entenas 2172 lingvojn kaj dialektojn.

## FACTS AND WORDS.

What is Esperanto, Dad?
The universal language, my boy.
Where is it spoken, then?
Why, nowhere.

There's something twisted in a sense of humor that can keep this decrepit old tarradiddle on its legs. Still it dodders from journal to journal. We would like to direct the eyes of its author to a few of the facts bearing on the recent progress of Esperanto:—

Cook's London office now publishes also in Esperanto its "Useful Information for Travellers."

The Red Sport Internationale in Russia has approved the use of Esperanto for the Spartakiad in Moscow this year. In various towns of Russia and elsewhere courses for athletes are being held.

The town of Mulhouse, France, and the Spanish town of Vio, have now a Zamenhof-street; Bergen - op - zoom, Holland, inaugurated a Zamenhof-square on 27 May, and a monument to the inventor of Esperanto is to be erected by the council of that town.

The president of the Milan (Italy) Fair, and of the Union of International Fairs, recently declared that Esperanto is suitable as a means of correspondence for international commerce.

Although spoken by comparatively very few of the world's population, Esperanto is, in point of space, the most widely spread language on the globe, adepts of it being found in almost every country. One can hear it spoken in scores of villages and small towns in Central Europe, the Balkans, and in regions of Russia where there is nobody capable of using any other national tongue than their own. A visitor to Bulgaria attests that through Esperanto he was privileged to enter the intimate life of the peasantry of that land, among whom English was unknown.

Clubs are found in every capital city of Australia and in many towns of New Zealand. The Melbourne Esperanto Club is a school through which are constantly passing some 80 students. There must be in Melbourne alone more than a thousand people who at some time or other have learned the language.

Por klarigo pri la Preternacio Konstancio, jam starigita de la Krist'-fratino, bv. al Eliot, 2 Cambridge-st., Willoughby, N.S.W.

## SIDNE(J)O.

Mr. W. Gray of Whelan's-rd., Leongatha, writes to bring to our attention that Zamenhof (page 481 "Originala Verkaro," date 21/6/1889) uses "Melbourne" and "Sydney" in their unchanged national forms. This letter was quoted in full on p. 163 (April, 1930, issue) of "La S.K."

## COBURG ESPERANTO CLUB.

Majo 10 la klubo havis festvesperon en la domo de l'prez-o, s-ro E. Williams, kies poŝo respondis la tutan elspezon. Tion li faris, motivate de la deziro direkti monerojn en la kason de la klubo. Membroj senlaboraj ricevis senpagan inviton, sed tiuj salajrohavaj enirpagis ŝilingon. Tre ĝuatan vesperon spertis 35 anoj kaj amikoj dancante, ludante. S-roj Saaren (citro) kaj Belmont (violono) donis dancmuzikon kaj amuzaĵojn. La kaso ricevis 28 ŝilingojn.

Sub gvido de s-ro Burns klaso de 15 lernantoj studas prepare por la "Ekzameno Memora je J. G. Pyke." Komitato de 5 personoj planaranĝas fondi Esp. librejon uzotan de membroj.

## SPLITOJ.

Diras la 1928 Jarlibro de la UEA: ". . . la demokrata sistemo emas nun tute universaliĝi." Ni dubas.

"La unua rusa lernolibro de Esperanto aperis en Pollando, la unua portugala en Germanio, la unua nederlanda en Svedlando, la kataluna en Madrid, la slovaka en Chicago, la turka en Parizo, la ukraina en Krakovo" (samcita).

"Kiam vi naskiĝis, vi ploris, kaj ĉirkaŭ vi ĉiuj ĝojis. Vivu tiel, ke kiam vi mortos, ĉiuj ĉirkaŭ vi ploru kaj vi ĝoju." (Lao-Tze.)

Al tiuj intencantaj ektraduki "Don Kihoto" 'n:—

"Probable vera estas tio, ke ekzistas neniu verko pli malfacila traduki, sekvante fidele laŭ la teksto de la originalo, ol "Don Kihoto." Tiu malfacilo devenas de la treega ofteco de ĝiaj idiotismaj frazturnoj. Ĉar la hispana lingvo per si mem estas tre idiotismeca, eĉ la rakonta parto de la libro estas malfacila; sed ĝia popollingvaĵe interparola parto estas intence plenplenigita per idiotismoj, ĉar unu el la ĉefaj personoj senĉese sin esprimas per proverboj. De ĉi tiu verko estas multaj anglalingvaj tradukoj, faritaj, mi supozas, laŭ diversaj gradoj de boneco. La du plej bonaj miaopinie estas tiuj de Motteaux kaj Smollett, kiuj ambaŭ estis verkistoj tre kompetentaj por la tasko." (Fraser Tytler, 1747-1814.)

## FOR YOUR BOOKSHELF.

**"Luno de Izrael," Rider Haggard, 5/6.**
**"Alegorioj el la Naturo," Gatty, 9d.**
**Postage extra.**

A large selection of literature, stationery, text books, dictionaries, badges, etc., obtainable from—

**MELBOURNE ESPERANTO SOCIETY**

**Box 731F, G.P.O., Melbourne.**

## OKULOJ KAJ VIDPOVO EN LA INSEKTA MONDO.

**(El "The Refractionist" London, 1/1/33.)**

At a meeting of the Interligo Tutmonda de Optikistoj kaj Okulistoj which took place at the London Refraction Hospital on 30th November, 1932, the secretary drew attention to the publication of an Esperanto dictionary of medical terms containing terms relating to ophthalmic optics. The Chairman called upon Miss I. L. Pickett to read a paper on "Eyes and Vision in the Insect World." A discussion followed. We give a summary of the paper in Esperanto.

(Resumo de prelego prezentata de F-ino I. L. Pickett, ĉe kunveno de la Brita Sekcio de la Interligo Tutmonda de Optikistoj kaj Okulistoj, ĉe la London Refraction Hospital, 30 novembro, 1932.)

Estas du ĉefaj specoj de okuloj en la insekta mondo. La plej grava estas la malsimpla okulo, pli precize nomata la okuletaro. La plej multaj insektoj havas paron da ĉi tiuj, unu ĉe ĉiu flanko de la kapo. Ĉiu okulo estas kovrita per travidebla haŭto, la korneo, kiu havas facetan aspekton. Tiaj insektoj, kiuj loĝas precipe en mallumo (ekz. kelkaj laborformikoj) havas nur 7-8 facetojn, sed libeloj kaj sfinksoj havas ĝis 20,000-27,000 en ĉiu okulo. Ĉiu faceto estas okuleto aŭ ocelo (latine ommatidium), kiu konsistas el du tavoloj de korneaj ĉeloj, unu duoblekonveksa, la alia konkav-konveksa, sub

kiuj estas kristala konuso, ĉirkaŭita de pigmento. La pinto de la konuso estas kunligita kun nervstangeto nomita la rabdomo. Ĉiu rabdomo konsistas el kvar rabdomeroj, ĉiuj ligitaj al longa nervĉelo (retinulo). Ĉi tiuj ĉeloj ĉirkaŭas la nervstangeton, kaj komunikas al nervfibroj. Ciu faceto ricevas malgrandan lumfaskon el iu direkto, kaj ĉi tiu fasko formas bildon nur de sia origina punkto. La bildoj estas ricevitaj de la cerbo unu apud alia kaj formas kune mozaikan-bildon de eksteraj objektoj. Ĉi tiu bildo estas iomete malklara, sed taŭgas al la bezono de la insekto, al kiu precipe utilas la kapableco rapide konstati eksteran movigon. Cetere, ĉirkaŭa vidpovo estas pli grava ol speciala centra vidpovo. Tial oni trovas, ke akrevidantaj fluginsektoj havas la plej grandajn kaj la malpli simplajn okulojn. Pli bona vidpovo troviĝas kun tre multe da malgrandaj facetoj, ĉar tiuokaze nur malgranda nombro de radioj estas ricevitaj de ĉiu retinulo, tamen la lumo estas malpli intensa. La okuloj de noktaj insektoj bezonas pli grandajn facetojn ol tiuj de tagaj specoj, ĉar la retinulo bezonas pli grandan aron da lumradioj.

Krom la okuloj, kiuj formas apozician bildon, laŭ maniero supreklarigita, kelkaj okuletaroj, precipe ĉe noktaj insektoj, formas supermetitan bildon per unuigo de radioj el apudaj facetoj. En taglumo la pigmento ĉirkaŭ la retinaj ĉeloj moviĝas antaŭen kaj limigas la radiajn faskojn tiel ke pli klara bildo rezultas. Kvankam ĝenerale insektoj ne havas fokuspovon, Vigier trovis ĉi tiun povon ĉe libeloj, kiuj povas kunpremi la kristalajn konusojn per muskolfibroj inter la okuletoj.

Krom ĉi tiaj okuletaroj la plej multaj insektoj havas 2-3 simplajn okuletojn (ocelojn). Ĉi tiuj konsistas el duoble-konveksa lenso, kaj travidebla stangeto sub kiu estas tasforma, pigmentĉela retino. Ĉi tio ebligas nur lumpercepton, kaj tial insektoj kiuj posedas nur ocelojn vidas tre malklare.

La antenoj partoprenas tiom kiom la okuloj en la gvidado kaj direktado de kelkaj insektoj, kaj la sentoj de gusto kaj flaro estas evoluintaj al neordinara grado, tial estas malfacila tasko provi la vidpovon, kaj ne mirinde se la eksperimentoj kelkfoje alportas kontraŭajn rezultojn. Kvankam insektoj ne posedas la duokulan vidpovon, ili kredeble povas bone juĝi pri distanco, sendube ĉar ju pli malproksima la objekto, des pli granda la nombro da lokoj kiuj stimulas unu faceton. Lubbock pruvis ke insektoj reagas al ultraviola lumo, sed ĉu per vido, ĉu per fotohaŭta sento restas necerta. Abeloj kapablas bone diferencigi kolorojn, kaj nur foje eraras pri blua aŭ verda koloroj. Vespoj ŝajne ne rekonas kolorojn, sed havas bonan formpercepton.

---

## RIDU NI!

Ĉe la Balo.

Li: Kie ajn estas la beletaj fraŭlinoj hodiaŭ vespere?

Ŝi (acide): Mi supozas, ke ili eliris kun la agrablaj viroj.

---

La elpensinto de "Sherlock Holmes" rakontas amuzan anekdoton pri si mem. Dum paroladovojaĝo tra Usono li alvenis al Boston kaj miregis kiam fiakristo haltigis lin kaj alparolis lin uzante lian nomon.

"Kiel vi sciis, kiu mi estas?" demandis Conan Doyle, kiu tre interesiĝis kaj iom flatiĝis pro la rekono.

"Nu—pardonu, ke mi tion diras," respondis la fiakristo, "la refaldaĵoj de via vesto aspektas kvazaŭ ili estis premtenitaj de New York-aj raportistoj; viaj hararo aspektas kvazaŭ ĝi estas tranĉita en Philadelphia; via ĉapelo ŝajne estas aĉetita en Chicago, kaj via dekstra ŝuo portas la koton de Buffalo —kaj—kaj—"

"Kaj kio?" demandis Conan Doyle.

"Nu," respondis la fiakristo, "mi vidis 'Conan Doyle' en grandaj blankaj literoj sur via kesto."

---

"Kaj kial," oni demandis al eta Mario, "vi volas edziniĝi kun aŭtoro?"

"Ĉar tiam, kompreneble, mi estus aŭtorino."

---

Barbisto: Kiel mi tranĉos vian hararon, mia knabeto?

Knabeto: Kun truo en la centro same kiel ĉe la patro.

---

Vi diras, ke vi akiras la vivrimedojn per la plumo?

Jes, iufoje mi skribas al mia onklo.

---

Li sidis en la dentistseĝo.

Kiom kostas la forigo de unu denteto? li demandis.

Por via, ses ŝilingojn, respondis la dentisto.

Kion vi diras? la suferanto kriis. Ses ŝilingojn por nur tri minutoj da laboro?

Nu, rebatis la dentisto, mi povas ankaŭ plilongigi la laboron, se tio plaĉas al vi.

---

Jean, ĉu vi jam brosis mian palton hodiaŭ?

Jes, sinjoro, kompreneble.

Strange! Mi havis du kronojn en la poŝo, kaj la mono ankoraŭ estas en ĝi.

---

Du malliberuloj renkontiĝis sur la promenkorto de Sing-Sing.

Kiom vi ricevis? demandis unu.

Ses jarojn, respondis la alia.

Pro kio?

Rabo de la Unua Banko de Ŝtato Montana. Kaj vi?

Dek jarojn.

Pro kio?

Mi fondis tiun bankon.

(la tri el Novial-organo, "Mondo.")

---

### COMENIUS KAJ ESPERANTO.

**Jan Amos Komensky (1592-1670).**

Malgranda **ĉehoslovaka** nacio, kiu vivas en meza Eŭropo, prave fieriĝas pro sia eminenta pedagogo, la fame konata **Jan Amos Komensky** (latine: Comenius), kiu jam en la 17-a jarcento parolis en siaj multaj verkoj pri la neceso de unu internacia helpa lingvo. Dum pli ol 30 jaroj okupis sin Komensky, la eminenta reforminto de lernejoj, per nia idealo: per la helpo de universala lingvo krei la fratecon kaj pacon inter la homaj gentoj.

Komensky estis la lasta episkopo de la Ĉeĥa Nacia Eklezio, nomata "Ĉeĥaj Fratoj," kiu estis multe persekutata de la tiama registaro de Habsburgoj. Li ne povis trankvile labori en sia amata patrujo; al li estis destinite—pro la amo al sia religio—vagadi kaj morti en la fremdlando. Lia ĉefverko estas la **"Didaktiko,"** en kiu li montris ne nur al siaj samlandanoj, sed helpe de la latina traduko al aliaj nacianoj, kiamaniere eduki kaj instrui la junularon. Estante ekzilanto en Londono, li detale preparis sian verkon **"Via lucis"** (Vojo de lumo), en kiu li plej multe skribas pri nova lingvo universala, kiun oni devus kaj povus krei, ĉar la internacia lingvo latina jam tiam ne sufiĉis por novaj bezonoj kaj esprimoj—

Estu tie ĉi cititaj kelke da esprimoj de la nobla Komensky, kiu per la universala lingvo volas helpi al la tuta homaro.

En "Via lucis (1641) li skribas:

"Do neeviteble ankaŭ nun, kiam ni serĉas kaj esperas reformon de la tuta mondo, estos bezona al tiuj, kiuj disdonos lumon de Saĝo, donaco de la lingvoj, aŭ estos bezona al diversaj nacioj ia **unu lingvo komuna.** Kaj tio,

## LA KORNIKO KAJ LA KRUĈEGO.

Korniko, preskaŭ mortanta pro soifo, trovis kruĉegon, kiu enhavis iomete da akvo ĉe la fundo. Sed la korniko ne povis atingi la akvon. Denove kaj denove li penis, sed sensukcese. Tiam li provis faligi la kruĉegon, por ke li povu havigi al si la akvon; sed li ne estis sufiĉe forta ĉi tion fari.

Fine li rimarkis multon da ŝtonetoj ĉirkaŭkuŝantaj. Post multe da klopodo li kunigis ĉi tiujn, kaj faligante ilin en la kruĉegon unu post la alia, li fine levigis la akvon ĝis la rando, kaj tiel povis trinki.

## THE CROW AND THE PITCHER.

A crow, almost dying with thirst, found a pitcher which had a little water in the bottom. But the crow was not able to reach the water. Again and again he tried, but without success. Then he tried to knock the pitcher over, so that he might get at the water; but he was not strong enough to do this.

At last he noticed a number of little pebbles lying about. After much trouble he gathered these together and, dropping them into the pitcher one by one, he at last raised the water up to the brim, and so was able to drink.

**Melbourne Esperanto Club.**—Meets every Wednesday, 8 p.m., in Australian Church Hall, Russell Street, Melbourne. Tuition, classes, conversation, etc. Secretary, Mr. R. Rawson, 169 Exhibition Street, Melbourne.

**Westralian Esperanto Society, Perth,** W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikaĵojn al la sekretario.

**Masterton (N.Z.) Esperanto Club.**—Meets Tuesdays at 8 p.m. in Y.M.C.A. Patrons: The Y.M.C.A. board of directors; Hon. Pres., G. R. Sykes, Esq., M.P.; Pres., Mr. A. Dewar, D.B.E.A.; Secretary, Mr. H. Franks, D.B.E.A. Address: 38 Worksop-rd., Masterton. Visitors welcome.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario; s-ro C. Brandon. Komunikaĵojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

**Wellington Esperanto Club.**—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. V. Leck; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, sinjoro P. Hudson; sekretariino, f-ino L. Irwin, D.B.E.A.. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18½h.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: s-ro A. W. Peacock; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbana Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str:, proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Vicprezidantoj: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane.

**Coburg Esperanto-Grupo**—Kunvenas ĉiuĵaŭde je la 8a vespere ĉe la Labour Hall, Sheffield-st., Coburg (malantaŭ Grand Teatro). Prezidanto, s-ro E. Williams; sek., A. W. Spencer, 48 Munro-st., Coburg. Vizitantoj ĉiam bonvenigataj.

## KVAKERISMO KAJ PACO.

**Mi havas senpagajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj paco por disdoni. Bonvole petu per ilustrita poŝtkarto aŭ letero al:—D-ro Fred J. Williams, Samaria, PAPUA. (fratorganoj bv. represu.)**

## MANĜO KAJ LABORO.

Estas konata al ĉiuj unu el punktoj de la fundamenta leĝo de Sovetio, de ĝia konstitucio:

"Nelaboranto ne manĝas."

Gia signifo kaj enhavo estas tiu, ke la nutraĵoj estas distribuataj en Sovetio proporcie al la kvanto da soci-utila laboro. Kiu ne deziras partopreni en tiu ĉi soci-utila laboro, tiu ne ricevas nutraĵojn. Nuntempe tiu principo estas tre rigore plenumata en Sovetio: se iu laboristo pro maldiligento, sen konsiderinda kaŭzo forestis ĉe laboro eĉ unu tagon—li estas maldungata kaj samtempe ĉe li estas forprenata la rajto aĉeti la nutraĵojn laŭ la ŝtataj prezoj kaj li havas nur la solan eblon—aĉeti la nutraĵojn ĉe bazaro laŭ la prezoj de libera merkato, multe pli altaj ol la ŝtataj. Kiu ne deziras labori, tiu ne ricevas la rajton aĉetadi nutraĵojn laŭ la malaltaj ŝtataj prezoj, li ne ricevas karton, kontraŭ kiu la nutraĵoj estas vendataj en magazenoj. Ju pli grandan soci-utilon prezentas la laboro farata, des pli grandan kvanton da nutraĵoj ricevas la laboranto. Tial, ĝenerale, laboristoj ricevas pli multe, da nutraĵo, ol oficistoj.

(El "Soveta Esp-a Unia Bulteno.")

kvankam ŝajnas esti neebla, tamen ne estas tia; la lasta estas ankaŭ pli facila ol la unua, ĉar **pli facile povas ĉiuj ellerni ion novan kaj unu lingvon, ol unu homo ĉion.** Do estos absolute necese elekti tiun vojon, ke oni formu ian lingvon por la tuta mondo komunan, kiun ĉiuj nacioj (eĉ tre nekleraj) povus facile ellerni."

Komensky deziris, ke tiu nova helpa lingvo estu ne nur por kleraj homoj, sed **por ĉiuj,** por ke oni povu per ĝi disvastigadi **inter ĉiuj nacioj** la lumon kaj civilizon, por ke la nacioj ĉesu malami sin kaj komprenu unu la alian.

La nova lingvo—laŭ Komensky—devas esti **pli facila** ol ĉiuj aliaj, **por ke** oni povu ĝin lerni sen perdo de tempo, **pli ĉarma** ol ĉiuj ceteraj, por ke estu ĝojego ĝin instrui kaj lerni, kaj **harmonia.** Se tia lingvo estos iam akceptita, "**ĝi** estos la plej konforma ilo por **unuigo de homoj** . . ."

Pri **la ebleco** de tia artefarita lingvo Komensky neniam dubis. Li diras en "Via lucis":

"Oni eble ne dubas pri ebleco **konstrui** lingvon novan. Se tamen iu dubas pri tio, mi diras, ke **tio estas ebla.**"

"Kiel Zeuxis, kiu Helenon pentri volante, al si venigis belkreskajn virgulinojn, kiom da ili estis eble trovi, kaj ĉion zorge ĉe ĉiuj ekzameninte, li aplikis tion al sia Heleno, tiel io simila ankaŭ ĉi tie povus fariĝi, se, kion ajn iu lingvo havas speciale solidan, ornaman, se do ĉio tio de ĉie estus kolektita kaj en tiun unu lingvon harmonie kunportita, por ke el multaj ĉarmoj fariĝu **unu** . . ."

Prave diras ĉeĥoslovaka esperantista poeto **dr. Schulhof:**

"Por la samaj celoj idealaj,
kiujn ni nun sekvas, plej kristalaj,
batis ankaŭ **lia bona koro."**

JULIE ŜUPICHOVA (Praha).

**Alter.**—P. 49, col. 1, line 15, "facts" (face); p. 53, col. 3, line 32, "filo" (fialo).

**NEXT NUMBER—July 18.**
**Latest Date for "Copy"—July 10.**

Wholly set up and printed in Australia by the Triumph Press
Surrey Hills, Victoria.